

# Heroldo de Esperanto

Sendependa organo de la Esperanto-movado / Semajna / Internacia / Universala

**Administracio:** Köln a. Rh. (Kolonjo), Brüsseler Strasse 94, Germanujo.  
**Redakcio:** Cefredaktoro: Teo Jung; resp. redaktoro: Joseph Berger; anonca redaktoro: Michael Wieland. La redakcio ne resendas manuskriptojn aŭ fotografaĵojn; retenu por vi koplon! **Telefono:** 5 68 93.  
**Subfakoj:** Librejo kaj Presejo. Skribante al ni, uzu por ĉiu fakoj (administracio, redakcio, librejo kaj presejo) apartajn foliojn! — **Prezo de Abono** (nur antaŭpage): 15 germ. rmk.; mendita per la poŝto aŭ rekte ĉe la eldonejo: 12 germ. rmk. Oni povas pagi kvaronjare.

**Dekunua Jarkolekto**  
**N-ro 17 (565)**  
**25 aprilo 1930**  
(4-paĝa)

**Prezo de Anoncoj:** po unucentimetra kolonero (62 mm larĝa) 1.20 rmk. Anoncoj (nur antaŭpage) kostas po vorto aŭ mallongigo 0.05 rmk., minimume 1.— rmk. **Rabato:** 3× enpresio 10%, 5× 15%, 10× 20%.  
**Poŝtaj ĉekkontoj:** (ĉiuj niaj kontoj funkcias sub la firmo „Heroldo de Esperanto, Köln, Germanlando“): Bruxelles 204.404; Budapeŝto 59.379; København 49.62; Köln 1117.76; Milano 3/954; Praha 781.93; St. Gallen IX/4602; Stockholm 41.80; Warszawa 191.094; Wien D 62.473; Zagreb 408.14; Zeist 130.630. — **Banka konto:** Deutsche Bank.

## Nia Jubilea Numero aperos nur la 2-an de majo.

Bedaŭrinde okazis al ni ĉagrena afero: la kliŝoj, destinitaj por la ĉefa folio de la jubilea numero kaj menditaj jam la 7-an de aprilo, pro malfeliĉa hazardo ne atingis nin ĝis la skribo de tiu ĉi artikolo. Ni do, vole nevole, devis prokrasti je unu semajno la eldonadon de la jubilea numero. Se la kliŝoj alvenos en la plej proksimaj tagoj (post skribo de tiu ĉi artikolo), tiel ke la prokrasto estos nur kelktaga, ni ekspedos la jubilean numeron, pli frue ol kutime, kune kun la hodiaŭa numero.

Unu avantaĝon tamen havis la prokrasto: ni povis konsideri ankoraŭ minimume 500 mendintojn de la jubilea numero, kies mendo alvenis post la fiksita dato, kaj kiuj alikaze ne ricevus ĝin.

Ni petas pardonon pro la unusemajna (aŭ, eble, nur kelktaga) prokrasto, sed la cirkonstancoj estis nunfoje pli fortaj ol ni. Ni bedaŭras ankaŭ ke, pro la cirkonstancoj, la hodiaŭa numero povas esti nur 4-paĝa. Kompense vi ricevos, per la jubilea numero, legajon egalan al minimume 64 paĝoj da libroteksto.

## Per Esperanto — por Esperanto!

La propaganda vojaĝo de s-ro R. M. Frey por Aŭstrio tra la skandinavaj landoj.

Al la devizo: „Ni nur povas venki, se ni povas montri al la mondo la praktikan taŭgecon de Esperanto!“ kaj al la entuziasmo de s-ro Frey ni dankas la multajn sukcesojn dum lia norda propagandovojaĝo por Aŭstrio per Esperanto, kiu daŭris de 15-a de februaro ĝis 26-a de marto nunjara. Antaŭ du jaroj, per simpla gratulkarto al pastro Ĉe okaze de liaj sukcesoj en Svedujo, s-ro Frey konatiĝis kun svedaj esperantistoj, precipe kun John Johansson, pere de kiu li estis invitata de Sveda Esp.-Federacio, Esp.-Ligo de Svedaj Instruistoj, Sveda Laborista Esp.-Ligo kaj urbestro de Stockholm Carl Lindhagen; poste ankaŭ de la Esp.-organizoj de Oslo, København, Holbaek, Berlin, Dresden kaj Praha.

En la nomitaj urboj kaj en 13 svedaj: Örebro, Karlstad, Norrköping, Eskilstuna, Uppsala, Gefle, Ludvika, Stockholm (Värtan kaj koncertdomo), Göteborg, Uddevalla, Borås, Helsingborg kaj Malmö li faris lumbildparoladojn (parte kun filmo), laŭfraze tradukitajn en la nacian lingvon, en Berlin kaj Dresden nur germane.

En Oslo s-ro Frey krome parolis per Radio, kiun vere efikplenan propagandon iniciatis la tre fervora UEA-del. Arne Arnessen, kiu turnis sin al la aŭstria ĝeneralkonsulo Caesar Bang kaj sukcesis per ties helpo aranĝi Radio-paroladon. Do li parolis po dek minutoj germanlingve kaj en Esperanto kun sekvinta traduko norvega de s-ro Arnessen. Ĝeneralkonsulo Bang telegrafe informis „Amtliche Nachrichtenstelle“ (oficialan gazetservon de la ŝtato), kiu donis la informon al Aŭstria Radio-stacio „Ravag“, kies parolisto diskonigis la honon de la parolado. Dank' al la bonega kaj rapida publikigo en Heroldo (n-ro 9) venis multaj leteroj ktp. al la Ministerio en Wien (el Hudiksvall telegrafis salute al Oslo s-ro Bugge-Paulsen kun 110 lernantoj), de kiu venos la respondoj iom pli poste, ĉar la koncerna referanto, sekcia konsilisto ing. Deinlein, troviĝas nuntempe ĉe konferenco en Paris. S-ro Frey publike dankas kore al la modelaj delegitoj de UEA Arnessen kaj Jens Schjerve en Oslo.

## Dua Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto gvidota de Andreo Ĉe. La urbo Arnhem (Nederlando) invitas oficiale.

La urbestro de Arnhem, plej bele situanta urbo en Nederlando, ĉe la Rejno, ĵus decidis organizi internacian Ĉe-kurson por pedagogoj el diversaj landoj, same kiel la urbo Budapeŝto faris en la pasinta jaro.

La kurso okazos de la 16-a de julio ĝis la 29-a de julio, do kongresanoj, vojaĝante al Oxford, povos profiti la bonan okazon partopreni en Ĉe-kurso. Ĉar la movado bezonas ĉiam pli da Esperanto-instruistoj,

Li ankaŭ tre dankas al ĉiuj s-anoj en ĉiuj 19 urboj, precipe al la nelacigebla ĉeforganizanto en Svedujo, redakt. Johansson, al ges-anoj Noll en København, Hanson (Holbaek), Wichert, Dauge, Glück (Berlin), Karsch, D-ro Arnhold, Zöphel, Kreidl (Dresden), Koutek (Praha).

La Esp.-grupoj en Berlin kaj Dresden sendis salutelegramojn al la Esp.-protektoroj liga prezidanto Miklas kaj liga kanceliero D-ro Schober.

Bedaŭre s-ro Frey ne povas detale raportiti, sed li akcentas, ke la „Propagando por Aŭstrio per Esperanto“ multe helpas al la Esp.-movado en la koncerna urbo, kie la ĵurnaloj serioze kaj en pli malpli longaj artikoloj pritraktis lian vojaĝon, kvazaŭ „duonoficialan“; la esperantistoj tie nun eluzu tiun okazon!

Kun ĝojo kaj dankemo s-ro Frey memoras la subtenon de la aŭstria ŝtataj reprezentantoj en tiuj landoj: Ambasadoro Buchberger (Stockholm), ĝen. kons. Bang (Oslo), Schwalbe (Göteborg), Ohlson (Helsingborg), kiu gastigis lin en Grand Hotel kaj hisis la aŭstrian kaj svedan flagojn, ĝen. kons. Sederholm (Malmö), ĝen. konsulejo en København, ambasadorejo en Berlin (kiu sendis du reprezentantojn al lia parolado), ĝen. kons. Eiselt (Dresden) kaj ambasadoro D-ro Marek (Praha).

La plej gravaj kunvenoj okazis en la koncertdomo en Stockholm (4.3.) kaj en la Universitata festsalongo en Oslo (6.3.). Entute s-ro Frey parolis 23-foje dum 39 tagoj, vojaĝante pli ol 5500 km.

S-ro Frey disdonis al eminentaj instrufak-

estas dezirinde, ke multaj personoj venu por prepari sin al tiu laboro.

En la kurso povos partopreni esperantistoj kaj neesperantistoj. Tial oni bonvolu instigi neesperantistajn instruistojn kaj studentojn al partopreno.

La kondiĉoj estos tre favoraj kaj interalie estos pluraj gastolokoj, disdonotaj al la frutempe aliĝintaj kursanoj. Pri la loĝado kaj manĝado, same pri ekskursoj al la

uloj 30 libretojn „Lehrbefähigungsprüfungen für Fremdsprachen“ (ekzamenoj pri instru-kapableco por fremdaj lingvoj) de Hofrat D-ro Wollmann (inter la 80 paĝoj estas 20 pri Esp.), kiujn la aŭstra instrumisterio disponigis al li.

Kompreneble li ĉiuloke parolis pri Internacia Esp.-Muzeo dum sia lumbildparolado kaj atentigis la samideanojn pri ĉi tiu nobla

vidindaĵoj de Nederlando (Amsterdamo, Hago, Utreĥto, insulo Marken, sekigaj laboroj ĉe la Suda Maro ktp.) la urbestro mem zorgos. **Detaloj pri ĉio baldaŭ sekvos.** Bonvolu jam nun aliĝi, por certigi al vi lokon.

Por aliĝo kaj informoj oni turnu sin al s-ino Julia Isbrücker, Oostduinlaan 32, Hago (Nederlando).

institucio, kiu ege estas favorata de la aŭstra ŝtato.

La oficiala celo de lia vojaĝo estis, plifortigi la korajn interrilatojn inter la nordaj ŝtatoj kaj Aŭstrio (je memoro pri la helpo al aŭstraj infanoj). Reciproke s-ro Frey nun faros radio- kaj lumbildparoladojn en Wien pri la nordaj landoj.

## La Ĉe-metodo daŭre triumfas.

Brila ekzamena festo de la Morariu-kursoj en Örebro (Svedlando).

La Esp.-kursoj de Tiberiu Morariu finiĝis la 5.4. vespere per publika ekzameno en la granda prelegejo de la bontemplanoj, kiun la publiko plenigis ĝis la lasta loko.

Post muzikaĵo de la Ponto-orkestro s-ro Bernhard Laven diris bonvenigajn vortojn en la nomo de la loka Esp.-grupo: „Pasis la kurso. Ĝi estas nun nur memorajo. Sed memorajo por la tuta vivo . . .“

S-ro Gumar Jansson arte prezentis kelkajn Esp.-kantojn, kaj poste sekvis la ekzamenado de la infana grupo laŭ la instrukcioj de red. Paul Nylén, LK, prez. de Sveda Esp.-Fed. La infanoj respondis kuraĝe kaj vigle kaj surprizis per la bonegaj respondoj malproportiaj al la mallonga studtempo. Rektoro Nissar eldiris tre favoran opinion pri la sukceshava Ĉe-metodo kaj varman laŭdon al la kursgvidinto.

En la paŭzo oni ĝuis ksilofonsolon de s-ro Ponto, kaj poste oni havis okazon admiri

unuhoran konversacion de la plenaĝaj kursanoj, kiuj laŭ la gvidado de s-ro Nylén jen respondis grupe, jen individue al la demandoj de T. Morariu el matematiko, geografio, botaniko, zoologio, ktp. en flua Esperanto. Estis tre impresaj, kiam la kursanoj faris fluan liberan konversacion en Esperanto inter si. Fine s-ro red. Nylén donis taŭgajn ekzemplojn pri la neceso de Esperanto kaj ĝia praktika uzo kaj esprimis koran gratulon de la Sveda Esp.-Instituto kaj Federacio al la kursestro kaj dankon al liaj helpantoj. (El »Nerikes Tidningen«, 7.4.30.)


La honora prezidanto de la ekzamena komisiono, D-ro Nordell, popollerneja inspektoro, esprimis sian grandan kontentecon pri la ekzameno de l' infana grupo.

6.4. (dimanĉe) okazis la individuaj ekzamenoj, kaj samtage vespere aranĝis la ĝeneralfeston kuneston por danki la instruistojn kaj diri al li bonvenon reen al Örebro.

En la festoĉambro de restoracio »Excelsior« okazis la lasta leciono eksterprograma de Morariu laŭ la konata, amuza Ĉe-metodo.

Inĝeniero O. E. Irving dankis al M. en la nomo de la gekursanoj. Poste li kaj s-ro Gustavsson transdonis memorajojn kaj florojn al M. Fine s-ro I. turnis sin per speciala saluto al f-ino Lizzie Anderson, la fianĉino de la kursgvidinto: „Ni diras tre koran dankon al la kunhelpantino de s-ro M., kiu korektis niajn skriblaborojn. Akceptu nian florbukedon kiel dankosignon!“ Oni transdonis donacon al s-ro Olle Persson, unu el la kunhelpantoj. Sekvis pluraj paroladoj, inter kiuj plej multajn aplaŭdojn rikoltis laŭlegita traduko de s-ro Nylén kiu majstre esperantigis la hindan nacian himnon. Gaja dancado finis la kuneston.

La 7.4. f-ino Ruth Olsson kaj la 10.4. f-ino Lizzie Anderson (ambaŭ lernintoj de M.) komencis siajn daŭrigajn kursojn por ses infangrupoj.



Sub la signo de l' printempo!

La anseroj denove paŝas al la paŝtejoj, por ke ili en aŭtuno ĝojigu nin per bongusta rostaĵo.



## Intervjuo kun la prezidantino de la Ligo de Nova Edukado: s-ino D-rino Elisabeth Rotten.

S-ino Rotten, la Berlina prezidantino de la Ligo de Nova Edukado, kiu eldonas en diversaj landoj revuojn sub titoloj: The new Era, Pour l'Ère Nouvelle, Das werdende Zeitalter, prelegis en Budapeŝt pri la celo de la Ligo. Mi havis okazon peti kelkajn respondojn de la simpatia prezidantino, kies agado devas multe interesi ĝuste la esperantistaron. Jen la intervjuo:

Kian rezulton havas ĝis nun la Ligo?

„La Ligo vidas en tio la rezulton de la ĝisnuna laborado, ke la tuta mondo ekatentis ĝian agadon.“

Kiuj estas ĝiaj plejproksimaj celoj en la estonteco?

„La atingeblaj celoj de la proksima estonteco estas, ke la Ligo akiru la atenton de la oficialaj rondoj kaj per tio estu tio realigebla por la grandaj amasoj, kio jam en malvasta kadro bone pruviĝis.“

Kion vi opinias pri la pedagogia valoro

de Esperanto?

„Mi ankoraŭ ne havis okazon detale studi la pedagogiajn valorojn de la lingvo Esperanto, sed mi opinias, ke ĝia instruado havas avantaĝon en tiaj unuagrada lernejoj (popol-lernejoj), kie oni ne instruas duan lingvon apud la gepatra lingvo.“

Ĉu vi konas la lingvon kaj la pedagogian revuon en Esperanto?

„Mi konas la lingvon Esperanto kaj la progres-spiritajn pedagogian fakrevuon en Esperanto kaj klopodas ankaŭ disvastigi ties ideojn laŭ miaj eblecoj.“

La esperantistaro, en unua vico la Berlina, devus pli intime rilati kun s-rino Rotten kaj kun la tre agema Ligo, donante okazon, ke ĝi bone konu nian lingvon, ĉar tia agema ligo, se ĝi kun siaj celadoj kune proponus la enkondukon de Esperanto, povus tre multe helpi al ni, eĉ pli multe, ol se nur la Esperantistaro pledas por la sama celo! P. B.

## Interŝtata kaj internacia lerneja interŝanĝo-servo ĉe la publikaj lernejoj en Rio de Janeiro.

Brazilia Ligo Esperantista (BLE), ekscitante pri la kreado de la „Interŝtata kaj Internacia Lerneja Interŝanĝo-Servo“ ĉe la publikaj lernejoj en Rio de Janeiro, tuj proponis sian helpon al la direktoro de Publika Instruado, D-ro Fernando de Azevedo, por la traduko de l' korespondadoj ricevitaj kaj sendotaj en Esperanto.

Dankante tiun proponon, skribis al BLE D-ro Jonathas Serrano, teknika subdirektoro de tiu departemento, kaj sendis al ĝi la unuan numeron de la oficiala „Bulteno de Publika Edukado“, kiu publikigis artikolon de Prof. D-ro Backheuser tradukitan el „Internacia Pedagogia Revuo“. Sur la koverto de tiu ĉi bulteno oni legas skribaĵojn en kvar naciaj lingvoj kaj ankaŭ en Esperanto.

Sekve de tiu kontentiga akcepto BLE dissendis cirkuleron, kiu enhavas kelkajn interesajn punktojn de la dekreto kreinta tiun servon, al gravaj revuoj kaj gazetoj, naciaj societoj kaj delegitoj de UEA.

## Universala Esperantista Pacifista Ligo.

Kies tasko estas interligi per Esperanto ĉiajn porpacajn elementojn, volas rilati kun kiel eble plej multaj ne-esperantistaj kaj esperantistaj pacifistaj kaj similaj unuiĝoj.

Estas evidente ke, por atingi tiun celon, la ligo bezonas ĉie energiajn, laboremajn pacifistojn, kiuj povas mem formi grupon kaj proponi efikan labormetodon aŭ konvinki jam ekzistantajn unuiĝojn pri la graveco de aliĝo al nia ligo. Estas necese, ke ĉie, kie okazos kongreso de pacemaj unuiĝoj, ankaŭ estu reprezentata nia ligo. Tion prepari estu la devo de niaj membroj.

Laŭ decido en la kunveno de UEPL dum la Budapeŝta Kongreso oni ĉiujare aranĝu indan manifestacion por paco kaj interpopola interkonsento. Tial ni alvokas ĉiujn UEPL-anojn, kiuj ĉeestos la Kongreson en Oxford, jam nun klopodi kaj labori, ke tie estu inda kaj sukcesplena manifestacio.

Sed, se ni volas serioze labori por tiu ĉi programo, se ni volas partopreni la praktikajn agadojn por la mondpaco de la aliaj pacunuiĝoj, ni nepre bezonas monrimedojn, ĉar

## Por perfektigi oni bezonas bonan vortaron.

Sperto instruas nin, ke multaj esperantistoj parolas kaj skribas Esperanton tre neperfekte, kvankam ili diligente kaj zorgeme ĝin lernis. Ankaŭ tio estas rimarkigebla, ke inteligentaj lernantoj, ne posedantaj bonan vortaron, ne longdaŭre ŝatas Esperanton, ĉar ili juĝas ĝin nesufiĉe matura por trafte esprimi la pensojn. Ofte okazas, ke esperantistoj ne povas interkonsenti pri la ĝusteco de iu vorto aŭ frazo. Kial? Ĉar mankas al ili por ilia perfektigo bona, riĉenhava vortaro.

Oni bezonas bonan vortaron:

1. por plifaciligi la lernadon de Esperanto. Se mi havas malgrandan vortaron, mi tre rapide trovas la serĉotan vorton, sed ne ĉiam la trovita vorto respondas al mia ideo. Plue serĉi pli trafan vorton estas vane, ĉar la disponebla vortaro ne prezentas tian. Kaj la rezulto? Restas en la cerbo de la lernanto manko je vortoj, kiu malfaciligas la pluan lernadon de la lingvo.

2. Ni scias, ke Esperanto, same kiel aliaj vivantaj lingvoj, enhavas multnombrajn sinonimojn, kiuj precizigas kaj pliriĉigas la esprimadon de pensoj kaj ideoj.

ne nur la preparo de la milito sed ankaŭ la preparo de l' eterna paco postulas monon. La afero de la paco estu tre grava por ĉiu vera esperantisto; ĉiu sentu la bezonon deklari per kotizo eĉ modesta sian pacifistan karakteron kaj subteni la packlopodojn. Tial ni petas aliĝi grandamase, ĉar nur la amaso povas garantii la sukceson. La minimuman kotizon de unu germana marko aŭ de egalvaloro poŝare ĉiu povas pagi. Ĉiu, kiu volas kaj povas labori por nia afero, proponu sin. Precipe tiajn gesamideanojn ni urĝe bezonas.

Bonvolu sendi vian aliĝon al direktoro Julius Glück, Berlin W 62, Bayreutherstr. 3, aŭ Oskar Fraenkel, Berlin-Charlottenburg 4, Krummestr. 58, aŭ fraŭlino Elise Jacobs, Flensburg, Mathildenstr. 9 (Germanujo), aŭ sinjoro Heinrich Michalek, Reichenberg, Lerchenfeldstr. 20 (Ĉeĥoslovakujo). — Mوندojn ni petas sendi nur al Oskar Fraenkel, Berlin-Charlottenburg 4, Krummestr. 58. (Poŝteĉkonto O. Fraenkel, Berlin 130518.)

Ekzemple, bona vortaro germana-Esperanta indikas ne nur: auf = sur. Ĝi montras, ke en apartaj kazoj oni devas uzi: en, al, laŭ, je, post, ĝis, per, por, super, pri ktp., krom la ofte necesaj liberaj tradukoj. Erarante tiuj ĉi vortar-malriĉuloj produktas multajn malkorektaĵojn.

3. Ĉu ili tiamaniere povas fariĝi perfektaj esperantistoj? Certe ne! Ili restos eble flue parolantaj fuŝparolistoj, sed ne korekte, bele parolantaj oratoroj, kaj pro tio ili estos taŭgaj objektoj de kritiko por la kontraŭuloj de Esperanto.

4. Ofte tiaj samideanoj kaŭzas multe da embaraso ĉe privata interparolado aŭ eĉ pli en kunvenoj, se ili ne ĝustatempe trovas la ĝustan vorton, se ili ne kapablas per plej konvena esprimo „trafi la kapon de la najlo“. Bedaŭrindaj estas tiuj samideanoj, ke ili ne posedas ĉiam pretan, sufiĉe ampleksan vortar-helpilon.

5. Nepre dezirinda riĉa vortprovizo ankaŭ estas por alternigi la vortmaterialon en paroloj, leteroj aŭ artikoloj. Per tio ni plibonigas la Esperantan stilon kaj konguras kun la esprimebleco de aliaj kultur-

lingvoj. Kaj riĉa vortprovizo ja estas akirebla ĉefe per bona vortaro.

6. Plue estas tre instrue, kompari la vortojn kaj esprimojn en nacilingva-Esperanta kun tiuj en Esperanta-nacilingva. Interese ankaŭ estas, se tiuj du vortaroj estas verkitaj de malsamaj lingvo-scienuloj. Du tiaj vortaroj certe pli bone klarigas iun vorton aŭ esprimon ol unu sola. Do komparu! Komparado akriĝas la spirito. Precipe akriĝas la komparado de Esperantaj vortoj kaj frazoj kun tiaj de la gepatra lingvo — sed refoje nur, se oni disponas pri bona vortaro kun multaj sinonimoj. Tio garantias ne nur amuzan, sed ankaŭ ĝustan, korektan traduklaboron. Per bona vortaro oni povas ĉiam animi la Esperantan stilon, povas refuti mallaŭdojn de fuŝkritikuloj, kiuj asertas ke Esperanto estas seka, formala, telegramstila, senamima. Kontraŭe! Ili legu ne nur iun ajn modelan Esperantan verkon, ili ankaŭ rigardu, antaŭ ĉio, en bonan vortaron por konvinkiĝi pri la amplekso de la Esperanta vort-kaj esprimtrezoro.

7. Ankoraŭ ion alian mi volas, ne — mi devas menci. Koncernas la ĝustan modelan formadon de la frazoj. Multaj eĉ jam progresintaj esperantistoj kelkfoje ne scias, ĉu tiu aŭ tiu verbo estas transitiva aŭ intransitiva. Ili ofte estas dubemaj pri la uzado de l' akuzativo. Precipe ankaŭ ekzistas duboj pri la uzado de prepozicioj. Kio nur povas savi el tiaj duboj? Bona, sufiĉe ampleksa kaj praktike aranĝita vortaro.

8. „Nobla estu la homo, helpema kaj

bona!“ diras la ĉefmajstro de la germana lingvo, Goethe. Sed kiel tio estas efektivebla, se mankas la rimedoj? Mi pensas pri seriozaj diskutoj en lernemaj rondoj rilate al dubaj esprimoj kaj frazoj. Ĉiu volonte kontribuas por forigi la dubojn; sed neniu povas doni aŭtentikan informon, ĉar mankas la certa helpilo — bona vortaro. Verŝajne iom malkontentaj, senkuraĝe ĝigitaj disiras la rondanoj. Kaj la sekvoj?

9. Restas ankoraŭ grava deziro: Esperanto servas al internacia interrilato; do ĉiuj popoloj bezonas Esperanto-vortarojn. Kiajn? Okaze de la tutmonda enketo de „Chemnitzer Tageblatt“, pri kiu siatempe troviĝis raporto en Heroldo, mi tradukis germanlingven 93 respondojn el 50 diversaj landoj. Kiom malsamaj — tamen pleje korekte — la unuopaj skribaĵoj! Klare oni povis diferencigi la skribintojn, kiuj havis modelan vortaron aŭ kiuj tian ne havis. Do, esperu ni, ke baldaŭ ĉiu popolo posedu plentaŭgan vortaron!

10. Fine, unu lasta penso aŭ sperto. Multaj lernintoj forlasas Esperanton, ĉar ĝi ne kontentigas ilin. Pro mallerteco sekve de nesufiĉa vortaro ili en Esperantujo ne trovis, kion ili serĉis. Tre bedaŭrinda fakto. Nur kiu havas modelan vortaron, ŝatas Esperanton kore, legas plezure en la libervole informanta vortaro, utiligas ĝin sukcese kaj ĝojas ke, dank' al sia bona vortaro, li fariĝis lerta, perfekta, konvinkita esperantisto. Sekvo? Li restas fidela al la afero.

De bonaj vortaroj dependas la sorto de estonta Esperanta vivo! Do...

Ernst Klemm.

## Kroniko de l' Esperanto-movado.

### Aŭstrio.

Linz a. D. Laŭ invito de Rotario-klubo, dir. K. P. Wannek, prez. de Supra-Aŭstria Esperanto-Societo, faris paroladon pri Esperanto. Granda sukceso: interesigo de eminentuloj, kiuj transdonis siajn adresojn por ricevi pluajn informojn. Gajno de la eldonanto de la plej grava supra-aŭstria gazeto „Tagespost“ por Esperanto. — 14. 4. Parolado kaj prezentado de lumbildoj kaj gramofonkoncerto hungara per D-ro Julio Lukács (Budapeŝt) kaj akompananto dum kunveno de la loka neŭtrala grupo de SAES. Interesa programo, granda aplaŭdo.

### Ĉeĥoslovakujo.

Gablonz a. Neisse. Germana Esp.-grupo „Izermontaro“ okazigos la 3. 5. 1930 en hotelo „Geling“ sian 20-jaran fondiĝfeston. Gesamideanoj alvenu multnombro, vi estas kore invitataj! — La grupano.

### Germanujo.

Dresden. Loka Societo de GEA. 14. 4. 30 okazis monata kunveno kaj samtempe la jarĉefkunveno en Kasino Gebr. Arnhold. La prez. Karsch enkonduke menciis la gravecon de la morto-tago de l' Majstro, atentigante pri la „festo de la originala Esperantoliteraturo“. Sekvis multaj sciigoj pri la kongreso kaj la Ĉe-kurso (vidu la kongresajn Bultenojn) kaj pri la farita propagando „Esperanto en la lernejoj!“ En la jarĉefkunveno la raporto montris vigan laboron sur ĉiuj kampoj de Esp.-varbado kaj en kelkaj rilatoj ĝojigajn rezultatojn. La estraro restis preskaŭ senŝanĝa. La vesperon finis legado de la memorskribaĵo pri la agoj de Karl von Frencell; riĉa aplaŭdo al la jubileulo.

Köln. La grupa vivo daŭre estas vigla; la grup-vesperoj ĉiumerkrede estas bone vizitataj. Pro sia centra situo en Eŭropo, Köln estas multe vizitata de eksterlandaj samideanoj. Lastatempe vizitis nin ĉefia, katalunaj, pola, aŭstralia kaj argentina samideanoj kaj esperantisto el Oxford, je pasko eĉ tuta karavano da nederlandanoj. La 16. 4. okazis varbvespero, dum kiu paroladis la prez. Fr. Kurth pri „Esperanto — kulturproblemo“, kaj T. Jung pri „Kun Esperanto tra 15 landoj“ (kun lumbildoj); ĉeestis s-ano Raven-Hart el Buenos Aires. Nova kurso komenciĝos en majo.

### Hungarujo.

Budapest. La aprila literatura vespero de la Budapeŝta grupo de Hung. Esp. Soc. estis eble la plej brila en la nuna jaro. Partoprenis en la sama programo s-anoj Bághy, Kalocsay kaj Sárossy, kio jam de jaroj ne okazis. Grava gasto, gimn. prof. D-ro Mezö faris interesan paroladon pri la sporto kaj Esp. (Pri tio ni raportos aparte!) Sekvis literaturaj programpunktoj, por (laŭ enkonduka parolo de reg. ĉefkons. D-ro Patai) montri la belsonecon kaj lit. taŭgecon de Esperanto. Krom la nomitaj barĵoj de Esperantujo akiris sukceson f-ino L. Hollán kaj s-ano L. Halka (per deklamoj). Aktorino Ila Szász montris karikature, kiel de-

klamus Esperante diversaj hungaraj geaktoroj. Menciinda estas ankoraŭ la bela violonludo de finna muzikisto K. Kaj, akompanata de fortepianartistino Kl. Maitinsky. Konferanto estis A. Hevesi. Ĉeestis konata hungara poeto E. Szép.

(Mallongigite laŭ raporto de P. B.)

### Japanujo.

Esp.-Kurso por Radio-telefonistoj. La Instituto de Radiotelefonio en Tokio, kiu estas la lernejo de radiotelefonistoj sur oceanŝipoj, malfermis Esp.-kurson por la lernantoj sub la gvido de s-ro Ošima de Japana Esp.-Inst.

La Ligo de Studento-Esperantistoj en Tokio. 2. 2. la Ligo havis sian 5-an kunvenon kun Esp.-studentoj de Imperia Universitato, Keio Univers., Jokohama Teknologa Kolegio kaj Tokio-Kolegio de Farmakologio.

Osaka. Esperantistoj en suda parto de la samnoma gubernio sin organizis kun la nomo „Izumi Esp.-Societo“. Ili kunvenas en ĉiuj dua kaj kvara sabatoj.

## Bibliografio.

Persa Esperanto-ŝlosilo. 80 pĝ. kaj kovrililo. Enhavas alfabeton, mallongan gramatikon, kelkajn ekzercaĵojn, radikaron kaj la „Esperon“. Nete presita, plaĉa libreto. Certe ĝi helpas multe al la disvastigo de nia lingvo en Persujo.

E. Lanti: Naĉismo. Studo pri deveno, evoluo kaj sekvoj. Sennacieca Asocia Tutmonda, Colmstr. 1, Leipzig O. 27, Germ. 124 pĝ., karton. Prezo rmk. 1.30. Hav-ebla ĉe la Librofako de Heroldo.

Recenzo sekvos.

### Gazetoj pri Esperanto.

World Radio, London. Tiu grava Radio-revuo publikigas leterojn de Esp.-parolantoj ĉe diverslandaj radio-stacioj. En numero de 14. 3. troviĝis letero de P. Kempeneers el Bruxelles.

The Sentinel, Wood Green, Anglujo, 20. 3. (art. pri Oxford) kaj 27. 3. (pri Esp.-diservo).

Bowes Park Weekly News, Bowes Park, Anglujo, 21. 3. Pri Esp.-diservo.

Le Petit Dauphinois, Grenoble, Francujo, 30. 3. Raportas pri bonfara vesperfesto de la Esp.-grupo.

Industriel Savoisien, komerca-agrikultura ĵurnalo, Annecy, Francujo, 22. 3. Kun anonco pri bonfara vesperfesto de la Esp.-grupo de Grenoble.

Berliner Illustrirte Zeitung, 23. 3. En artikolo „Milito kontraŭ akridoj“ parolas la aŭtoro A. T. Wegener pri vizito al malgranda vilaĝo de bahaĵoj en Transjordanio, kie li renkontis Esp.-instruiston.

Der Mittag, Düsseldorf, Germanujo, 2. 2. enhavis artikolon „Internationale Rundfunksprache“ (Internacia Radio-lingvo), en kiu la aŭtoro esprimas la opinion ke artefarita lingvo ne povas peradi kulturajn valorojn.



## Tra la mondo.

— La Londona Konferenco pri malmarmado de la flotoj finiĝis per kontrakto inter Britujo, Usono kaj Japanujo rilate malpliigo de la tun-kvanto de iliaj militŝipoj kaj submaraj boatoj en la proporcio de 15 : 15 : 9. La kontrakto estas verkita angle kaj france kaj konsistas el proksimume 16 000 vortoj.

— La lastan tempon okazis aro da brulakcidentegoj. La urbo Sagay, Filipina Insularo, estas tute bruldetruita, dudeko da homoj mortis, 12 000 estas sen rifuĝejoj. En alia Filipina urbo, Capiz, same ekestis incendio. — Terura brulego okazis ankaŭ en la rumana vilaĝo Costesci, kie 110 personoj, plejparte junaj kaj infanaj, suferis flammorton en preĝejo. — En New York brulmortis 5 personoj en ludomo. — En Funaesdalen en Jemtland (Svedujo) 101-jara virino, unu el la plej aĝaj de la lando, mortis en flamoj.

— En malliberejo de Columbus (Ohio, Usono) brulmortis 317 kaptitoj, proks. 300 estis pli malpli grave vundataj.

— En la Filipina provinco Leyle okazis tornado, kia ne estis en la lastaj jaroj. Ĝi kaŭzis netakseblan damaĝon, detruante la tutan rikolton. Kelkaj homoj mortis.

— Sur la Nilo en Kairo renversigis velboato; 20 personoj dronis.

— La kaptitoj de l' malliberejo en Howard, Providence, (Rhode Island, Usono) ribelis. — En Calcutta, Hindujo, proksimume 100 ribeluloj atakis la armilejojn de la polico; ĉe tio kvin homoj estas mortigitaj.

## Letero el Polujo.

Politiko. — Kinematografaĵoj. — Biblioteko.

Unu el la plej gravaj politikaj okazintaĵoj de la lasta tempo en Polujo estas, sendube, estinta krizo de registaro, kaŭzita pro la esprimo de malfido per la Sejmo al la kabineto de Prof. Bartel kaj restarigo de la antaŭa registaro kun la ĉefministro kolonelo Slawek, ĉefgvidanto la t. n. „kolonela grupo“ en la bloko de kunlaborado kun la registaro (partio de Marŝalo Pilsudski). Tiu ĉi registaro elvokis multan komenton kaj malkontenton en la opozicie agorditaj vicoj. Nun la Sejmo estas „forpermesita“ kaj oni ne scias, ĉu ĝi estas entute dislaxota kaj okazos novaj elektoj aŭ post la paskaj festoj estas kunvokota la eksterordinara sesio. La plej proksima estonteco certe solvos la enigmon.

La legataron de „Heroldo“ certe intereso la stato de kinematografio en Polujo. Tial mi prezentas al ĝi kelkajn nombrojn, ĉerpitajn el la oficiala statistiko. En la tuta lando estas 631 kinematografejoj, kun entute 203 000 sidlokoj. (Kompreneble, tiu nombro ne estas tro granda, kompare kun Germanujo, U. S. S. R. kaj Ameriko.) Laŭ la nombro da kinematografejoj ĉefurbo Warszawa okupas la trian lokon (57), sed laŭ la sidlokoj (31 800) la unuan en Polujo. La plej grandan nombron da kinematografejoj havas Łódź (60 kun 20 600 sidlokoj), poste sekvas Poznań (59 — 19 100 sidlokoj). En la jaro 1928 vizitis kinematografejojn en Warszawa (1 150 000 loĝ.) — 12 608 000 personoj. La nombroj da kinematografejoj en la lando ĉiam kreskas, ĉar oni konstruas multajn novajn. En Warszawa kaj en la aliaj grandaj urboj multaj kinematografejoj adaptiĝis al la sonfilmoj kaj sekve de la „triumfo“ de l' tekniko multnombraj familioj restis senlaboraj. Jen ankoraŭ malbona flanko de la progreso!

En Polujo ekzistas 19 sciencaj biblio-



Ĉefministro kolonelo Slawek, gvidanto de la tielnomata „kolonela grupo“ en la pola registaro.

tekoj ĉe la superaj lernejoj, enhavantaj kune 2 562 000 volumojn. La unuan lokon laŭ la nombro okupas biblioteko de Varsovia universitato — 749 000 volumoj, la duan universitato en Kraków — 532 000 volumoj, la trian universitato en Poznań — 337 000 volumoj, poste

## Infernaciaj nuntempoj.

### Artikoloj de Wells.

En la Pariza gazeto „Le Quotidien“ la fama aŭtoro Wells publikigis serion da artikoloj pri starigo de internacia paco per federaciigo de ĉiuj nacioj. Li proponas ke — por sukcesi — du aŭ tri ĉefaj nacioj komencu, kaj li opinias ke Anglujo kaj Usono devas esti tiuj nacioj.

Sed li konkludas ke tia konstruo estos ebla nur, kiam la popoloj sufiĉe komprenos ke tiu rimedo estas la nura: kaj ke sekve oni devas enirigi tiun ideon en la spiritojn.

Bedaŭrinde li ne aldonas ke la taŭga rimedo atingi tiun rezulton estas disvastigi uzadon de Esperanto, necesa ilo, kiu portas en si tiun ideon kaj aŭtomate enirigas ĝin en la spiritojn: oni neniam sukcesos malaperigi la naciajn apartaĵojn, se oni ne esprimas la supernaciajn ideojn per, speciaj: por tio taŭga, lingvo ne havanta formojn, kiuj ĉi-momente memorigas ekzistadon de apartaj nacioj.

Konservu zorge la naciajn lingvojn por unuigi ĉiun nacion; sed uzu internacian lingvon por internacia federacio: tio estas la plej taŭga rimedo por starigi kaj daŭrigi tiun konstruaĵon.

### Dumiljara datreveno de naskiĝo de Virgilio.

Oni, tiun ĉi jaron, solenas la dumiljaran datrevenon de la naskiĝo de Virgilio, kiu okazis en vilaĝo hodiaŭ nomata Petiola apud Mantovo (Italujo).

## Stanislavo Leszczyński kaj Ligo de Nacioj.

Dum festosoleno por dekjara datreveno de Ligo de Nacioj, okazinta lasttempe en Varsovio, paroladis s-ro August Zaleski, pola ministro por eksterlandaj aferoj kaj samtempe nuna prezidanto de la Konsilantaro de la Ligo. Jen liaj vortoj:

La 16-an de januaro nunjare la Konsilantaro de Ligo de Nacioj solene festis en Genevo la dekjaran datrevenon en sia ekzisto. Apenaŭ pasis kelkaj semajnoj kaj jam ŝajnas, ke en multaj artikoloj kaj paroladoj, kiuj aperis pro tiu okazintaĵo tra la tuta mondo, oni ĉion priskribis, kio tuŝas la Ligon, oni pri-diskutis ĉiujn problemojn, kiuj staras antaŭ ni.

Kiu hodiaŭ ankoraŭ ne aŭdis pri la problemo de organizado de la paco, pri malmarmado, pri arbitracio kaj interpacigo, pri sistemoj por antaŭgardi la eksplodon de militoj? Jen estas la problemoj, kiuj okupas la intelekton de ĉiu pensema homo. Ne ekzistas hodiaŭ vera inteligentulo, kiu ne pripensadus ĉi tiujn demandojn, ne eble estas imagi politikan intelekton, kiu ne konsideras ĉi tiujn problemojn.

Se la Ligo de Nacioj nenion alian estus farinta ol nur tion, ke ĝi metis antaŭ la okulojn de l' homaro ĉi tiujn grandajn kaj tiom gravajn por komuna bono problemojn, jam pro tio oni povus diri, ke ĝi plenumis tre grandan taskon.

Sendube estas, ke jam antaŭ la apero de Ligo de Nacioj ekzistis personoj, kiuj iris al politika forumo kun la pacideo sur siaj lipoj, penante popularigi ĉi tiujn ideojn kaj klarigante al la homoj, ke ĝuste en tiu ĉi paco kuŝas ilia propra bono. Sed ĉu ilia voĉo ne estis voĉo en dezerto? Por tio estis necesa la plej granda milito, kiam la mondo vivspertis, ke, sub influo de l' timo antaŭ ĝia ripetigo, la homaro komencu krei organizaĵon, kies ĉefa tasko estas eviti novan militan kataklismon.

Nur post kiam la homoj estos komprenintaj, ke malnovaj metodoj por eviti militojn, je kiuj ili kredis dum jarcentoj, esprimitaj en la tezo: „Si vis pacem, para bellum!“ necese devas esti anstataŭgataj per io nova, kio marŝus laŭ nova vojo, vojo kontraŭa, nur tiam ili agos laŭ la ŝanĝita proverbo: Si vis pacem, para pacem!

En tiu ĉi laboro Pollando, kiu jam de jarcentoj estis apostolo de la paco inter la nacioj, ne permesis preterkuri sin al iu ajn. Ĝi ja bone scias, ke marŝante al ĝenerala bono de l' homaro, plej facile estas trovi ankaŭ la propran feliĉon.

La penlaboroj, sur tiu ĉi vojo plenum-

sekvas universitatojn en Lwów kaj Vilno enhavantaj po 328 000 volumojn. La aliaj superaj lernejoj posedas pli modestajn librarojn. Krome ekzistas ankaŭ publikaj (urbaj) kaj privataj bibliotekoj havantaj multajn milojn da volumoj.

J. Dratwer, Warszawa.

Li kantis ĉarmojn de la kampara vivo kaj famigis en sia nemortebla poemo Eneido (tradukita en Esperanton de D-ro Valienne) aventurojn de la Troja heroo, filo de Ankiso, fondinto — laŭ legendo — de la roma nacio.

La ĉefaj festoj okazos en Italujo, unue en Mantovo, kie okazos ekspozicio de Virgiliaj memoraĵoj kaj relikvoj, kaj de mirinda eldono de Eneido; poste en Napolio, kiun ŝatis Virgilio, kaj apud kiu li estis enterigata, laŭ Danto.

Oni ne interkonsentas pri la loko de tiu enterigado. Kelkaj diras ke, se la cindroj de Virgilio estis tie deponataj, la tombo estis dufoje perforte malfermata, lastan fojon dum la reĝado de Roberto de Andecavo, reĝo de Napolio; aliaj diras, ke, antaŭe, la korpo estis transportita Francujon.

Oni posedas nenian aŭtentikan portreton de la poeto, kvankam en Romo estas marmora busto, kiu, oni diras, lin reprezentas; kaj aliparte la du statuoj, kiuj nun ekzistas en Italujo, estas modernaj kaj nenio pravas ke ili similas lin.

### Internacia kongreso de normaligo.

Tiu kongreso okazos en Parizo dum la monato de majo; en la programo estas studo de rimedoj por atingi ŝparon de laboro: tamen mankas la ĉefa, kiu estas internacia lingvo Esperanto.

Rollet de l'Isle.

itaj, estas ĝenerale konataj kaj ilin mi ĉi tie ne pritraktos.

Jam antaŭ du jarcentoj, nia patrujo havis grandan ŝtatviron, kiu povas esti kalkulata al la vico de ideoj patroj de Ligo de Nacioj. Mi parolas pri **Stanislavo Leŝĉinski** (\*). Tiu ĉi malfeliĉa mormarko kaj granda pensulo, **Intencis krei Ligon de Nacioj**. En memorskribaĵo, ĝis nun konservata en Nancy, li tiel detale preparolas la tutan komplekson de la problemoj, ligitaj kun kreo de tia internacia organizaĵo, ke oni admiras lian subtilecon kaj eksterordinaran kapablon profunde penetri la plej komplikitajn problemojn.

Leŝĉinski eliras de la principo, ke la paco ne povas esti konservata, se ne estos kreita Ligo de Nacioj, celanta gardi la pacon. Por tiu ĉi gardado, laŭ lia konvinko, devas servi antaŭ ĉio **sankcioj**. Se oni jam ne povas malhelpi eksplodon de la milito, almenaŭ, li diras, oni devas serĉi manierojn, por ke la milito fariĝu katastrofo por tiuj, kiuj ne ŝanĉelis elvoki ĝin.

Kvankam konforme al la spirito de tiama tempo li deziras kompletigi sole per kristanaj regnoj sian organizaĵon, kiu cetere ampleksus tutan Eŭropon krom Turkujo, tamen aliaflanke liaj ideoj estas tiom modernaj, ke li opinias, ke respubliko multe pli taŭgas por konservado de la paco ol monarkio.

Ministro Zaleski citis poste ankaŭ aliajn ĉapitrojn el la memorskribaĵo de Leszczyński, kie temas pri taskoj de la Ligo, pruvante, ke principo de arbitracio kaj interpacigo ne estis fremda al Leszczyński. Kiom trafe li pripensis sian projekton oni vidas el tio, ke li diras, ke plej grandaj malfacilaĵoj venas de la flotoj de la marpotencoj. Tiel ekde ili oni devus komenci organizaĵon de la Ligo, skribas Leszczyński.

Tradukis D-ro Jan Mędrkiewicz.

\*) Pola reĝo, bopatro de la franca reĝo Ludoviko XV.

## Aŭstrio enviciĝis la plej modernajn vagonojn en la eŭropajn translimajn trajnojn.

La funkciulo de „Oesterr. Bundesbahnen“ (prez. D-ro Banhans), montris la 28-an de marto al la reprezentantoj de la internacia gazetaro (mi ĉeestis kiel reprezentanto de „Heroldo“) la novan tipon de kvaraksaj vagonoj triaklasaj, kiuj de nun regule estos enviciĝataj en la translimaj trajnoj.

190 tiaspecaj vagonoj, la plej modernaj en Eŭropo, estas liverataj — la prezo po 125 000 ŝil. — kaj certe estos kun plezuro frekventataj de la pasaĝeroj, vizitontaj nian belan landon Aŭstrio.

La vagonoj estas 21 m longaj; ilia skeleto entute estas fera kaj ili reprezentas la plej malmultepezan kaj firman feran vagontipon, kiu donas al la vojaĝantoj ĉe akcidentoj la plej grandan sekurecon.

Mallonga priskribo: 4 malgrandaj kaj 2 grandaj kupeoj kun 72 sidlokoj kun ledaj dors- kaj brakapogiloj; abunda elektra lumigado; laveblaj tapetoj kaj kaŭĉukaj tapiŝoj; 1 m larĝaj metalkadraj fenestroj, fikseblaj en ĉiu loko; regulebla ventolilo en ĉiu ejo; kesteto kun materialo por unua helpo, fajrestingilo kaj kesteto kun hakilo kaj segilo. La necesejoj estas en la mezo de la vagono, elegante kaj moderne instalitaj kun lavopelvo kaj mantukoj.

„Oesterr. Bundesbahnen“ konstruigas ankaŭ kvaraksajn modelajn vagonojn por rapidtrajnoj translimaj (por la 1-a kaj 2-a klasoj), kiuj en julio estu je uzado de niaj gastoj, per rapidtrajnoj vojaĝantaj Aŭstrian.

Steiner.

## Diversaĵoj.

### Plantoj eksplodantaj.

Fakte ekzistas kelkaj plantoj, kiuj sub certaj cirkonstancoj eksplodas aŭ ekbrulas, ne brulkonsumigante. Ĉe la diktamno, arbustsimila kreskaĵo kun blankaj aŭ rozkoloraj floroj, trovebla en suda Eŭropo kaj Azio, oni povas observi en varmaj, senventaj tagoj strangan fenomenon. Se oni alproksimiĝas al la arbusto kun brulanta kandelo aŭ alumeto, subite eksplodas neatendita artfajraĵo: la arbusto staras en flamoj. Sed post la estingigo de l' fajro ĝi ree prezentiĝas tute sendifekta, kaj nur stranga odoro memorigas pri la fajra ludo. Kiel kaŭzon de tiuj eksplodoj oni konstatis eteran oleon en la floroj de l' diktamno kiu, sub la influo de la varmo, povas elradii bruleblan gason. En varmegaj tagoj, kiam la diktamno plene floras, la ĉirkaŭa aero estas ofte plenigita per gaso tiom, ke kelkfoje, precipe antaŭ fulmotondroj, okazas eĉ spontaneaj ekbruloj. Ĉe la homoj la enspirado de tiu gaso ofte efikas naŭzon, eĉ senkonscion.

Malgrandajn fajrajn eksplodojn oni povas observi ankaŭ je la „Acajou“-arbo, troviĝanta en Centra kaj Suda Ameriko; ĝiaj fruktoj, „acajou“-nuksoj, entenas ĉeltavolojn plenajn je brulebla kaj facile ekflamiĝebla oleo. Se oni estigas proksime de tia nukso flamon, kiu varmigas la nukson, la aero sub la ŝelo plivolumentigita, elpremante samtempe la oleon el la frukto. Sammomente la oleo ekbrulas kaj ĉirkaŭas la nukson per eta fajreraĵo. Tial oni nomas la fruktojn de l' „acajou“-arbo ankaŭ „fajraĵaj nuksoj“.

### Fenomenulino de spirado.

Dum kunveno de sciencistoj en Vaŝingtono oni montris antaŭ nelonge junan virinon, kiu faras nur 3 ĝis 5 spirojn pominute, kontraŭ 15 ĝis 18 de la normala homo. Eĉ gravmalsanuloj spiras almenaŭ 10 fojojn pominute. Ĉi tiu kazo, konata de kvin jaroj, estas unika; nek en la medicina literaturo nek per enketo inter 70 000 kuracistoj oni povis trovi similan fenomenon. La enspiro estas pli profunda ol normale, la virino enspiras trioblan kvanton da aero ol aliaj homoj. Kiel kantistino ŝi povus daŭrigi opajn notojn dum nekredeble longa tempo, kiel rapidkuristino trakuri 200 metrojn kun unu sola spiro. Sed ŝi ne havas intereson por tiaspeca okupado; ŝi estas asistantino en kolegio fiziologio.



„Ion bonan alportas tia rompiĝo de l' akvokondukila tubo: la telerlavado pretiĝas pli rapide!“ (Humorist.)



# Anstataŭia Edzino

Romano de Erica Maxwell • Traduko el la angla de M. Sampson

18

Malgraŭ la protestoj de Cara li faris, kion li diris, Dolĉega sento de dormemo kaptis ŝin, kaj ŝi permesis al li kovri ŝin per lankovrilo kaj aranĝi la kusenon. Ŝia antaŭa timo ŝajnis al ŝi ridinda kaj nekredibla en la atmosfero de boneco kaj fidindeco, kiun kreis Julian. Fine, Cara estis subigata de lacego, kiu estis la natura sekvo post la okazaĵoj de la lastpasintaj semajnoj kaj kiu kulminis per la ega aktiveco de la lastaj dudek-kvar horoj.

La vizaĝo de Julian, atenteme klinita super la manuskripton, estis la lasta, kio sentiĝis al la konscio de Cara, antaŭ ol ŝi ekdormis. Tamen, ŝia lasta penso estis pri la virino, kies lokon ŝi uzurpis. La mistero pri la kio de Sophie Karenska estis ankoraŭ solvota; sed kiel kaj kiam, tion lasis Cara al la estonteco.

Kvankam Julian ŝajnis esti tre okupita per sia laboro, tio estis, pli vere, por trankviligi Cara'n, ol kun la espero, perlabori ion valoran. Sin vidante ĵetita mezen de vera dramo, li trovis ke liaj fiktivaj homoj jam perdis sian ĉarmon. Kiam la regula spirado de Cara sciigis lin, ke ŝi dormas, liaj okuloj serĉis ŝian vizaĝon. Malgraŭ siaj dudek-ses jaroj, ŝi dormis kiel infano. La laca aspekto malaperis de ŝiaj trajtoj kaj, kvankam la malhelaj okulharoj falis sur iom palan vangon, la viva beleco de ŝia vizaĝkoloro per la kontrasto eĉ pli montriĝis. Ŝiaj lipoj estis iomete malfermitaj, kaj iliaj kurboj estis dolĉaj kaj allogaj.

Julian jam rimarkis ke neniam fiereco estas ĉe tiu ĉi virino kiu, laŭ lia opinio, havas en siaj vejnoj nobelan sangon. Pastro Stepan diris al li ke Sophie Karenska estas grafino. Certe Julian ne multe interkonatiĝis kun iuj aristokratoj en Aŭstralio, aŭ ie ajn alie, escepte de la aristokratoj de koro kaj intelekto; sed li jam kreis en sia menso bildon pri tio, kion oni povus atendi de tiu klaso. Ĝis nun tiu rusa fraŭlino nenion montris el la karakterizaĵoj, kiujn li atribuis al virino de ŝia naskiĝo, se li priskribis ŝin en romano. Sed li diris al si, ke tio ne turmentus lin; li ja estis dankema pro tio. Eble la spertoj de la estintaj kelkaj jaroj en Ruslando igis ŝin kaŝi tiun sintenon, kiu estus natura al ŝi de ŝia naskiĝo. Certe, tia konduto estis la plej saĝa en Sovetlando. Kredeble, malgraŭ ĉio, Sophie Karenska posedis nature dolĉan kaj man emon, ĝis la afero de Pauloff portempe frenez-

igis ŝin. Kvankam Julian rezonis laŭ falsaj supozoj, la rezulto por li mem kaj por la fraŭlino, kiu tiel pace dormis, estis tute kontentiga. Intereso kaj kompato, kaj decido ke ŝia estonteco estu tute malsama ol la pasinteco, ekposedis lian koron. Don Kifoto vekigis ĉe Julian.

La eniro de l' servistino, kiu alportis komunikon por Julian de la direktoro de hotelo »Surrey«, revenigis Cara'n al la ĉirkaŭaĵoj. Julian lasis ŝin kun ordono uzi ĉiujn liajn posedaĵojn, kaj trinkmono emigis la servistinojn je la servo de Cara.

La danko de Cara malligis la langon de la knabino. „... tute kontentega ion fari por la edzino de



„Se vi estus vera viro, vi ne tolerus similon sen kontraŭstaro!“ (Life.)

sinjoro Firth,“ ŝi diris. „Sed ni ĉiuj opiniis ke li estas fraŭlo. Oni neniam scias, ĉu?“

Cara ruĝiĝis je la amikeca scivolemo, dum ŝi staris antaŭ la spegulo ordigante la hararon. „Li ne estas ĉi tie sufiĉe longe por ke vi konu lin,“ ŝi kuraĝis diri.

„Ho, tio ne gravas,“ respondis la knabino, nekaŝeme. „La edzoj ofte rigardas nin. Ni knabinoj multe lernas diversmaniere. Sed sinjoro Firth, kvankam li estas kompleza, ne estas tro libera. Permesu ke mi helpu vin! Vi havas belan hararon; kaŝtankolora, ĉu ne? Diru al mi, se mi tro babiladas! Mi ne povas akiri anglajn manierojn. La virinoj ĉi tie ofte ne ŝatas, kiam mi komencas. Ili rigardaĉas min. »Sufiĉe, Mary, vi aŭstralianino ne scias vian rangon!« kaj dummomente mi preskaŭ perdas la spiron. En la komenco tio kolerigis min; sed nun, kiam mi loĝadis ĉi tie dum kelka tempo, mi scias ke ili ne povas ŝanĝi tion. Nu, nun vi estas bela. Sinjoro Firth mendis por vi tagmanĝon, kiun oni servos por vi private tie ĉi.“

„El kiu parto de Aŭstralio vi estas, Mary?“ demandis Cara, ŝatante ŝian amikan voglecon.

„Collingwood estis mia hejmo, sinjorino Firth, kaj mi donus mian jaran salajron por revidi Smith-Straton vendrede vespere. Ofte mi tiel sopiregas al la hejmo, sed la »Surrey« estas la plej bona laborejo, kiun mi trovis ĝis nun. Estas plezurego por mi aŭdi aŭstralian voĉon. Vi povas rideti, sed ekzistas diferenco.“

„Mi tion aŭdis diri la anglojn,“ respondis Cara. Tiam ŝi riskis la demandon: „Kion vi pensas pri mi, Mary?“

„Nun vi demandas ion,“ respondis la knabino, flanken klinante la kapon. „Estas io aŭstralia en viaj vortoj, sed ankaŭ ŝajnas al mi, ke vi havas fremdan akcenton.“

„Mi havas iom rusan sangon, do mi supozas ke tio estas tute natura,“ respondis Cara.

„Se ĉio, kion mi aŭdas, estas vera, estas bone por vi ke vi forlasis tiun landon,“ diris Mary. „Nu, vi aspektas pli bonfarta nun ol kiam vi envenis, mi ja devas konstati.“ La knabino malrapide foriris.

La koro de Cara subite ekspertis deziregon je ŝia propra lando, ĉar tia ŝi ĉiam konsideris Aŭstralion. Ŝi estas aŭstralianino laŭ naskiĝo kaj edukado. La infano de la patrino ĉiam estis la granda gvidilo dum ŝia junvivo, kaj la memoro pri ŝia naskiĝlando ĉiam restis en ŝi vigla. Cara deziregis ke ŝi povu forlasi Londonon, kun la memoroj de sia malfeliĉo, kaj sin trovi ĉe sudaj bordoj. La okazintaĵoj de la pasintaj tagoj lacegigis ŝin. Tuj kiam ŝi liberiĝos el tiu reto, en kiun ŝi mem lasis entiri sin, ŝi klopodos reiri Melburnon.

Tiam ŝi ekmemoris ke ankaŭ Julian naskiĝis en Aŭstralio. Ĉu tia fakto simpligus aŭ malsimpligus la aferon, ŝi ne povis diveni. Ŝi aŭdis lian voĉon ĉe la porde, kaj li envenis, sekvate de la servistino portanta pleton.

Fine de majo aperos la dua eldono de Julio Baghy:

## VIKTIMOJ

libro form. 18x13, ĉ. 230 paĝoj sur senligna papero. La plej fama originala romano en Esperanto! Antaŭirinta ĉiujn primitivajn romanojn. Prezo broŝ. 4.—, simple bind. 4.50, lukse bind. 6.— rmk. plus 10% sendkosto.

Mendu ĉe librovendejo de Hungaria Esperantista Societo Laborista, Budapeŝt VIII, József körut 50.II.9; aŭ Heroldo de Esperanto, Köln, Brüsselerstr. 94

Kiu antaŭpagos al la librovendejo de HESI tri ekzemplerojn ĝis 15. 4. (transoceanaj landoj 15. 5.), ricevos unu ekzempleron senpage. Aliaj antaŭpagontoj ricevos belan librodonacon.

Baldaŭ aperos  
**Se Grenereto...**  
Originalo de Kenelm Robinson  
Kun dediĉo „Al la Majstro André Gide“.

**Lernu sen instruisto en kvar horoj Internacianal-stenografion!**

Ĉiu skribas en ĉiu lingvo per Internacianal-stenografio (Isto) kvar-kvinoble pli rapide ol per la ĝisnuna longa skribo; rapidskribistoj eĉ dekoble.

Ĉiu sono, ankaŭ vokalo, estas skribata per streko, ne simbole, ne plidikige. Multaj ses-jaraj infanoj lernis Iston pli facile kaj pli rapide ol la longan skribon. Fakte notarie atestita!

Isto estas egale taŭga por Esperanto kaj por ĉiuj kulturlingvoj sen alilernado de sonstrektoj. Esperantlingvaj gvidiloj por 22 lingvoj estas disvastigataj en ĉiuj landoj.

Vere internacia kiel Esperanto! **Isto kaj Esperanto aspiras la saman celon.**

- Internacianalstenografio** por Esperanto (fundamenta lernlibro) 1 RM
- 1-a aldono: Germana, Angla, Franca, Hispana, Itala, Pola, Rusa . . . 1 RM
  - 2-a aldono: Sveda, Dana, Nederlanda, Portugala, Rumana, Greka, Latina . . . 1 RM
  - 3-a aldono: Serba, Bulgara, Ĉeĥa, Ukraina, Hungara, Turka, Japana 1 RM
- Ĉiu aldono donas Esperantlingve la uzadon de Internacianalstenografio por sep lingvoj.
- Instituto de Internacianalstenografio, Duisburg (Germanujo), Friedenstrato 79, Poŝtĉeko Essen 2714.**

(La eldonaĵoj pri Isto estas ankaŭ haveblaj ĉe la **Libreja Fako de Heroldo.**)

**Nepre**  
menciu Heroldon skribante al la anoncantoj!

Jenaj gepartoprenintoj en la Ĉe-kursoj de Lektoro H. Seppik deziras korespondi:

- Eskilstuna (Svedujo):**
- S-ro G. A. Norrman, ĉeftelefonlaboristo, Vidlundsgat. 9, kun Ĉinujo kaj Japanujo pri telefono.
  - S-ro Lennart Norrman, gimnaziano, Vidlundsgat. 9, k. ĉ. l. pri sporto.
  - S-ro Georg Nyström, lignajisto, Nyforsgatan 19, kun Ruslando k. a. l.
  - F-ino Anna-Lisa Ohlsson, Järnvägsgatan 17, kun Germanujo kaj Hindujo.
  - S-ro Carl H. Olsson, komizo, Fiolen 1-16, kun Anglujo pri komercaj aferoj.
  - S-ro Karl L. Ohlsson, laboristo, Odlaren 34, kun Usono.
  - S-ro Axel H. G. Pettersson, komizo, Storgatan 5, kun Anglujo k. a. l.
  - S-ro Edvin Pettersson, fabriklaboristo, Storgatan 34, kun Anglujo k. a. l. pri komercado.
  - S-ro Evert Pettersson, laboristo, Vasbergsgatan 1-2, kun Germanujo k. a. l.
  - S-ro Folke Pettersson, fabriklab., Nyforsgatan 47, kun Germanujo, Danujo, Japanujo k. a. l. pri interesaj kaj klerigaj aferoj
  - S-ro Oscar Pettersson, laboristo, Vasbergsgatan 1-2, kun Ruslando k. a. l.
  - F-ino Sonja Ringkvist, Orion 14, kun Germanujo kaj Usono.
  - S-ino Frida Rundström, Ekhult Grangärdet, kun Italujo, Japanujo, pri virina movado.
  - S-ro Axel J. Sahlén, Grängsgatan 13, kun Ruslando k. a. l. pri socialaj temoj.
  - S-ro Gösta Stenmark, laboristo, Gimnastikgat. 4, k. Germanujo, Anglujo pri filozofio.
  - S-ro Gösta Svahn, fajlilisto, Bergsgatan 17, kun Danujo k. a. l.
  - S-ino Ellen Svedberg, Lohegatan 31, kun Aŭstrujo, Hindujo, Japanujo, pri virina movado.
  - F-ino Aina Svenson, virinĉapelistino, Venus 5-6, kun Germanujo.
  - S-ro Karl V. Svärd, laboristo, Ostran F. kun Japanujo, Aŭstralio k. a. l.
  - S-ro Nils Thernström, kontoristo, Sommarogatan 10, k. Germanujo, Anglujo, Egiptujo.
  - S-ro Bengt Thorning, laboristo, Odlaren 11, kun Ameriko k. a. l.
  - S-ro Bengt T. Widergren, seruristo, Kungsgatan 51, kun Japanujo k. a. l.
  - S-ino Signe Wählstedt, Tallbacka Västermalm, kun Ĉinujo k. a. l.
  - F-ino Linnéa Zetterlund, Marieborg Brottssta, k. ĉ. l.
  - S-ino Alma Svänsson-Agren, Vidlundsgatan 11, kun Japanujo, Ĉinujo, Hindujo k. a. l. pri la virina movado.
  - S-ino Ingeborg Olson, ĵurnalistino, Eskilstuna-Kuriren, k. ĉ. l.
  - S-ro John A. Ackerlund, Bergahed Berga, k. ĉ. l. pri la abtinencula movado.
  - F-ino Helga M. Österlund, komizino, Bergsgatan 6, k. ĉ. l.

**Strange!**

Vi estas germanlingvano kaj ankoraŭ ne konas la libron de A. Dormanns? Jen notu ĝian titolon por tuj mendi ĝin ĉe la eldonejo „Heroldo de Esperanto“ en Köln, Brüsseler Strasse 94:

**Alfred Dormanns**  
Leiter der Esperanto-Kurse beim Westdeutschen Rundfunk

**Handbuch des Esperanto**  
Ein Buch für Selbstunterricht, Rundfunk und private Kurse.

En kvin partoj. 320 paĝoj; kun bildo de la aŭtoro. — Prezo: en moderna kovrilo kartonite RM 3.30; tole bindite RM 4.95; inkluzive sendkosto.

**Heroldo de Esperanto, Köln**

**Oomoto Internacia**  
N-ro 41, majo 1930

**PREZENTAS**

le sekvantajn artikolojn: Religio kaj ĝia progreso de V. Stojan; H. G. Wells kaj UEA de Migranto; Sono de Sono de H. Deguĉi; Bataloj en Dia Mondo de O. Deguĉi; 8-a listo de brikdonacintoj; — ? — de V. M. Siŝkov; Letero el Algerio de M. Mantoz; Nia Penso (poezio) de S. Frantz; Malavara bulgaro ofertas domon aŭ terenon por la Domo de Homamo; Filmarto; Bibliografio ktp. ktp. Du fotografaĵoj de Finnlando kaj Algerio

**Jarabono kun senpaga U. H. A.-Membrokarto por ĉiuj landoj 3 svik, Poŝtĉekkonto: Paris 448.77**

Petu senpagan specimenon!

Ĉiu abonanto ricevas premie 10 belajn ilustr. Oomoto-poŝtkartojn.

**Abonu ĉe S-ro Koogecu Niŝimura**  
124, rue de la Pompe  
**Paris 16**

**Renovigu vian abonon!**